

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

## Intervenaj Projektoj Kulturoj de daŭropov(ec)o (KdD) – Kiel ni volas vivi?1

**Por:** Wolfgan Gunther[8]
w.guenther.esperanto@web.de

"La ideo de daŭripovo
estas nek elpensaĵo de modernaj teknokratoj
nek mensofulmo de ekofrenezuloj...
Ĝi estas nia origina monda kulturheredaĵo."
(U. Grober, 2010).

### Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco. Ni mem ja jam estas la nepoj pri kiuj temas

**Resumo**

La teksto kompilas faktojn kaj pensojn pri la aktualaj krizoj de justeco kaj de ekologio kiel homfaritan krizon de la homa kulturo, distinĝanta de ĉiuj antaŭaj pro la faktoj de senlimeco kaj transgeneracieco. La artikolo submetas Esperanton kaj ties organizitajn kaj organizantajn formojn kiel modelon de kultura agado al la senalternativaj kriterioj de Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripovo, aparte al la lasta. Ĝi prezentas social-ekologian memidenton de Esperanto kune kun la subteno den oficiala submetiĝo de la organizita esperantismo al la neceseco de daŭripovo en la propra laboro per jurisdikcieblaj sindevoligoj. Priskribatas ideo kaj funkcio de la kulturoj de daŭripovo (KdD). La transformado de la homa socio estas adresata kiel vojo de ekonomicentrigata kulturo de globaligo (tutmondigo) em social-ekologian kulturon de daŭripovo. Kulturo ne pravigas mediodetruon! Jen la ĉefa devenpunkto ankaŭ por la enordigo de Esperanto en la KdD. Pli detale el-montriĝas la tri karakteriziloj de la neŭtrala internacia lingv jene: 1. Integra trans-kultureco, 2. Demokratia Dulingveco kaj 3. Ekologia Konformeco. Estiĝas moderna alestonteca nepotaŭga difino de Esperanto kiel "lingva parto de socialekologie daŭripova internacia-transkultura komunikado-interkompreniĝado de la mondo". Praktika solvo povus esti ekz. daŭripovokoncerna amendo de la statutoj de

8 Estas D-ro kuracisto de la Esperanto-Centro Harleshausen en Kassel, Germanio (FRG), Ekologo - Kulturoj de Daŭripovo - Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), Esperantisto - Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj artisto.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Esperanto-1 Okaze de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto 2014, Bonaero 2 Estas D-ro kuracisto de la Esperanto-Centro Harleshausen en Kassel, Germanio (FRG), Ekologo - Kulturoj de Daŭripovo - Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), **Esperantisto** - Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj artisto organizaĵoj, kiu ekz. povus konduki al aplikado de kompenso-mekanismo koncerne la nedaŭropovecajn efikojn de la propra laboro. Fine de la kompilaĵo estas temigata la problemo de
"de scio al ago". Tie estas priskribataj novaj alpaŝoj solvi ĉi dilemon per kunefikado de racio kaj empatio. La tuta artikolo organiziĝas kiel teksto, interrilatanta faktojn pri daŭripovo kaj ties koncernoj por la generacioj de la nepoj.
**Ŝlosilvortoj**: Empatio; Esperanto, Kulturoj de Daŭripovo (KdD); Krizo de la kulturo; Vivmedi-etiko.

***Resumo***

*O texto compila fatos e pensamentos sobre a atual crise da justiça e da ecologia como uma crise feita pelo homem nas culturas humanas, distinguindo de todos os itens acima por causa dos fatos do infinito e através da coisa gerada. O artigo sustenta que o Esperanto e suas formas organizadas como um modelo de atividades culturais para os critérios sem alternativas de Paz, Direitos Humanos e Desenvolvimento Sustentável, especialmente o último. Ele apresenta um auto identidade sócio-ecológica de Esperanto, juntamente com o apoio da apresentação oficial do Esperantismo organizado para a necessidade de desenvolvimento sustentável no seu próprio trabalho por sem dever de ligação com o possível dedo da justiça. Ideia escritas sobre e em função das culturas de sustentabilidade (KDD). A transformação da sociedade humana e abordada como uma forma de cultura economia centralizada de cultura social-ecológica do Estado globalizado (globalização) membro da sustentabilidade. Cultura não justifica os meios de destruição! Aqui são o principal ponto de proveniência também no arranjo do Esperanto na KDD. Mais precisamente mostra-se de três características da língua internacional neutra da seguinte forma: 1. integral transculturalidade, 2. bilinguismo democrático e 3. Conformidade ambiental. Torna-se uma definição para alem do futuro dos netos modernos a definição do Esperanto como uma "parte linguística do transculturalismo internacional na comunicação para a inter compreensão socio-ambientalmente sustentável do mundo." Uma solução pratica poderia ser, por exemplo. Dar continuidade ao poder de se preocupar com a alteracao dos estatutos de organizações esperantistas, que, por exemplo. poderão levar a aplicacao de um mecanismo de compensação em relacao aos efeitos como algo que nao pode durar de seu proprio trabalho. No final da colecao e tematizado o problema do "conhecimento para a ação." Nao são descritos novo passos a resolver esse dilema*



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

*da razão e da empatia. Todo o artigo esta organizado como texto, interagindo fatos sobre a sustentabilidade e as suas preocupações para a geração dos netos.*

***Palavras-chave****: Empatia; Esperanto; Culturas de Sustentabilidade (KDD); Crise da cultura; Ética como estilo de vida.*

1. Ĉiu el ni estas filo kaj/aŭ nepo kaj ĉiu el ni dependas de justa mondo kaj sana vivmedio. Ni havas problemon: Estas nek justa mondo nek sana vivmedio. La situacioj de maljusta mondo kaj de malsana vivmedio eĉ malpliboniĝas. Jen la devenpunkto…

**2.** La ekzisto de la individua kaj kolektiva homo kaj la sinsekvo de niaj generacioj submetiĝas al kelkaj esencaj neforigeblaj universalaĵoj. 1-e. La limigateco de nia unu komuna Planedo en la senco, ke la kvanto de la materialaj resursoj kaj la eltenpovo (resilienco) de la biosfero principe havas limojn, kiujn ankaŭ reciklado povas nur tempe antaŭenŝovi. Dekuplado de kvanteca ekonomia kresko disde naturdetruo pere de teknologiaj kaj socialaj novigaĵoj estas iluzio. Necesas kompreno pri sócia kaj individua bonstato-bonfarto, kiu ne egaligas ĉi-lastan al ekonomia kresko. (s/ d)

2-e. La kunaparteneco de la homo al la naturo en la senco, ke la homo estas (nur) parto kaj ("partnero") en la tuto de la kun-vivomedio. Samkiel la evolucipovo de socioj dependas de kultura diverseco, tiel tiu de naturaj sistemoj de biologia diverseco. La nuligo de genetikaj materialoj same kiel la perdo de kulturaj identoj signifas absolutan redukton de evoluciaj kapacitoj. "La homaro estas parto de la naturo kaj la naturo estas parto de ni. Kaj la naturo estas la sumo de ĉiuj fortoj, kiuj estigadas kreivan vivon." (2013)

3-e. La rilativeco de nia mondo en la senco de samtempa ekzisto de identoj kaj (ties) (interrilatoj (ekologio). "La mondo estas nek subjektiva nek objektiva, ĝi estas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

rilatva…

Individuoj kaj la biosfero ampleksas ambaŭ, la materialajn procesojn kaj la sencoportajn rilatojn." (3) Nia mondo laŭ sia trea "naturo" estas interrilata tutaĵo kompleksa-paradoksa, konsistanta el partoj-individuoj, kiuj interrilatadas per du kodoj, la abstrakta-genetika-binara kaj la sentata-somata-analoga, kaj kiuj strebas al akordiĝo kaj kunvivo. (2013)

Necesoj-bezonoj, ebloj kaj konstruo-realigo den komunikado kaj dialogo konkretigas ĉi universalaĵojn, ekz. forme de la "Ĉarto pri Transdisciplineco", se temas pri la homa komunumo.(s/ d)

Ĉi universale agnoskataj faktoj konsideratas ankaŭ kiel fono por social-ekologie daŭripova estonteco de la homaro, respektive de daŭripova evoluo-evoluigo. ***Ĝuste ĉi-sence daŭripov(ec)o estas "nepotaŭgeco".***

**3.** La apero de la libro "Muta Printempo" (originale "Silent Spring") de la marbiologistino Rachel Carson en la jaro 1962 markas turnopunkton en nia kompreno pri la interrilataro de vivmedio, ekonomio kaj homa bonstato. ***Hodiaŭ en 2014 ni estas la generacioj de la genepoj de tiu turnodato. Kiun ni benas? Kiun ni benu?***

La koncepto pri daŭripovo priskribas zorgeman-antaŭzorgan ekspluaton den la planedaj resursoj kaj utiligon den regenereblaj sistemoj de la biosfero ĉe kaj por konservado de ties esencaj trajtoj por la viva materio. (2010a; 2010b e s/ d).

***Daŭripovo do celas la stabilecon de la biosfero (ekologia materialismo, (2012)*) *kaj la ebligon de la vivo en la epoko de niaj nepoj.* **(2013)** *Ĝi responsigas la nunan homon pri tio, kio okazas al la nuna kaj venonta mondo.***

Ni parolas pri ekologie daŭripova evolu(ig)o. Principe tiu signifas "depreni el



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

la naturo ne pli ol povas rekreski aŭ esti reproduktata (regenerado, reciklado) kaj ŝarĝi la biosferon nur per tiom da poluoj (vivmedikontaminado) kiom ĝi povas kompensi sen damaĝo (vivmediokonformeco). Agadamaniero (ekz. ekonomio) estas ekologie daŭripova, se ĝi daŭreme povas esti praktikebla estontecen.

La aktuala social-ekologia situacio de nia mondo estas i.a. priskribata en la "Raporto pri la Viva Planedo 2012" (originale "Living World Repaort 2012, vd. interreton) de la "Fonduso pri la Monda Sovaĝeja Vivo" (originale "World Wildlife Fund", WWF). Laŭ tiu la nuntempa konsumo de la homaro superas la kapaciton de la Tero koncerne resursojn kaj regeneropovon je 30 %j – tiel, ke ekde la jaro 2030 necesus dua Planedo por kovri ĉi troan konsumbezonon.

Atentigendas la kompleksa-paradoksa problemaro koncerne superfluaĵojn kaj disipojn.

Ĉi troo plejparte rilatas al nutraĵoj (aparte al viando), akvo, energio (industrio, trafiko, komunikado, turismo ktp.) samkiel al spaco por infrastrukturoj. Estas eksplicite starigata la postulo pri "reveno de la mondo al vojo, kiu ebligas konsumon kadre de la limoj de la Planedo" (s/ d). Resume tekstas en la "Ĉarto de la Tero" (s/ d): "La manieroj de produktado kaj konsumo kaŭzas dezertiĝojn-nuliĝojn de la vivmedio, troekspluatiĝon de la resursoj kaj masivan speciopereon. Ili subfosas niajn komunumojn. La gajnoj el la ekonomia evoluo ne estas distribuataj juste kaj la breĉo inter malriĉuloj kaj riĉuloj pliprofundiĝas: 800 milionoj da homoj malsatas, kvarono de la homaro vivas je malpli ol 1 dolaro ĉiutage. Maljusteco, mizero, nekleriĝo kaj violentaj konfliktoj disvastiĝantas kaj kaŭzas grandajn suferojn. Senmodela kresko de la mondloĝantaro troŝarĝas la ekologiajn kaj socialajn sistemojn. La fundamentoj de tergloba sekureco estas minacataj. Tiuj ĉi estas danĝeraj evoluoj, sed ili ne estas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

nehaltigeblaj."

Ambaŭ cititaj publicaĵoj modele ilustras la jam en la jaro 1982 formulitajn por nia mondo minacajn problemkampojn karbondioksido, investmono kaj mondloĝantaro. (1981) Ŝajnas esti tiel, ke krom la migrantofluoj pro ekonomia mizero ("socialturismo") kaj militoj la klimatoŝanĝiĝo (= tergloba altiĝo de la temperaturo ĝis 4 gradoj ĝis la fino de ĉi jarcento) (2013; s/ d) pro la antropogena bruligo de fosiliaj fueloj, pro senarbarigoj kaj pro la agrikulturo fariĝas pli kaj pli la fokuso de la krizo.

Oni akre atentu pri tio, ke la alparolitaj aktulaj krizoj grave diferencas de ĉuj antaŭaj pro la fakto, ke ili transpaŝas limojn kaj generaciojn!

**Resumo:**

**La social-ekologia daŭripovo hodiaŭ ne estas opcio, sed porekzista demando, trafanta ĉiun. Laŭ la UNESCO daŭripova evoluo estas sen alternativo. (2011; 2008)**

**4**. La situacio de nia nuntempa globilizita-globalizanta mondo surbaze de kapital-, novigaĵ- kaj teknologi-apogata ekonomia kreskomodelo (2010; s/ d) estas karaketerizata per tio, kion oni nomas la tuttergloban krizon. Tiu konsistas el la antagonismo inter 1-e. la krizo de justeco (Ankoraŭ ĉ. 20 %j de la homaro en la "evoluitaj" industri-kaj konsumnacioj produktas kaj konsumas ĉ. 80 %jn de ĉiuj resursoj kaj varoj kaj per tio estigas propran riĉecon je la kostoj de malriĉeco kaj subnutriĝo en la ceteraj regionoj de la mondo), kaj 2-e. la krizo de la vivmedio (La stato de la biosfero plue malpliboniĝas kun la centraj kriterioj de varmiĝo de la Tero, klimatoŝanĝiĝo kaj altiĝa nombro de gravaj "naturkatastrofoj" kiel tempestoj, incendioj, dezertiĝoj ktp.)

La problemo estas, ke la krizo de justeco devas esti solvata sen plua akrigo de la krizo de la vivmedio. Ni bezonas ambaŭ, justan mondon kaj sanan vivmedion.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

"Sociala vido kaj pura aero!" Tia la slogano. Principe tio atingeblas nur per rezigno en la konsumsocioj, t.e. per redukto den la "konsumo den la mondo" pro la t.n. "okcidenta vivstilo" (Kapvortoj: efikeco, ekosufiĉeco, malakcelado, paradigmo de malplio, kvaliteca ekonomia kresko, sociala justeco, senglobaligo ktp.) (2004; 2002; s/ d)

**5.** La studo "Limoj de Kresko" de la Klubo de Romo jam en la jaro 1972 avertis pri la nebremsita ekspluatado den la planedaj resursoj kaj pri la minacoj al la ekosistemoj kaj deklaris nerezignebla la ŝanĝiĝon de la okcidentaj kulturnormoj.

En la jaro 1975 la Fonduso Dag Hammarskjold aperigis sub la titolo "Kion nun?

Alia evoluigo.", koncepton kun la tri fundamentaj postuloj:

1-e. Kontentigo de la bazaj bezonoj de la homo.

2-e. Memdependeco, memdeterminado kaj memrealigo de la homoj kaj popoloj.

3-e. Ekoevoluigo.

Ĉi dokumento fakte estas la unua, en kiu estis unusignife asertata la imanenta interrilataro de la homa kaj vivmedia statoj-fartoj.

***Jes, ni hodiaŭ estas la nepoj de ĉi antaŭa epoko kaj la nuntempaj socialekologie konsciaj inter ili certe benas la kunlaborintojn de ĉi fonduso.***

Nuntempaj streboj al daŭripova estonteco plej ofte uzas kiel difinon de daŭripov(ec)a evolu(ig)o tiun el la t.n. Brundtland-Raporto de la UN el la jaro 1987 kun la titolo "Nia Komuna Estonteco". Ĝi tekstas (s/ d):

"Daŭripova evoluo estas evoluo, kiu kontentigas la bezonojn de la nunaj





generacioj sen kompromiti la kapablojn de la futuraj generacioj kontentigi siajn proprajn bezonojn."

Ĝi enhavas du ŝlosilajn konceptojn:

1-e. La koncepton de bezonoj, speciale tiujn de la malriĉuloj de la mondo, al kiuj oni direktu la plej gravan prioritaton, kaj 2-e. la koncepton de limigoj, trudataj per la stato de teknologio kaj socialaj

organizaĵoj sur la kapablo de la vivmedio kontentigi la nunajn kaj futurajn bezonojn."

Ĉi paradigmo konsideras la mondon kiel sistemon, kiu konektas spacon kaj tempon. Ĝi jam rilatas al intra- kaj inter-generacia justecoj, koncerne al kaj la bezonoj de la homoj kaj la limigoj de la Planedo kontentigi tiujn. Kompare al la aktuala stato de la mondo, ĉi universala koncepto ja estas malproksime de iu grava realiĝo.

***Kiujn la hodiaŭaj nepoj (mal)benu? Kiujn la morgaŭaj nepoj (mal)benu?*** Ĉi-koncerne la "Internacia Instituto pri Daŭripova Evoluo" (originale "iisd") konstatas (s/d): "La koncepto pri daŭripova evoluo helpas nin kompreni nin mem kaj la mondon. La problemoj, kiujn ni renkontas, estas kompleksaj kaj seriozaj – kaj ni ne povas adresi ilin laŭ la sama maniero per kiu ni ilin kreis. Sed ni povas adresi ilin."

***Negrave ĉu kiel avo, patro, filo aŭ nepo…*** Ekde la Rio-Konferenco de la UN en la jaro 1992 validas por la mondvasta evoluo de la homaro la tri neintertrakteblaj universalaj gvidprincipoj:

1-e. Paco,

2-e Homaj Rajtoj kaj

3-e. Daŭripovo.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Tio signifas, ke ĉiuj decidoj en la kvar kampoj 1-e. Ekonomio (= "publikbona" mondo), 2-e. Ekologio (= vivipova mondo), 3-e. Socialo (= justa mondo) kaj 4-e. Kulturo (kune kun 3 = vivinda mondo) mezurendas je tio, ĉu ili servas la pacon, kongruas kun la homaj rajtoj kaj akordas kun la kriterioj pri daŭripovo. En la tensiokampo de ekonomia, ekologia, sociala kaj kultura daŭripovoj racie-prudente prioritatas la celo de ekologia daŭripovo, ĉar la protektado-konservado den la naturaj vivokondiĉoj estas la fundamenta antaŭkondiĉo por kaj la ekonomia kaj la sociala stabilecoj. (s/ d)

Social-ekologia daŭripovo do konsistas el:

1-e. Ekonomie prudenta agado, orientata je etike responsiva investo de mono kaj je la publika bono.

2-e. Ekologia responseco pri stabila biosfero kaj absoluta ŝparemo pri resursoj.

3-e. Sociala justeco kaj egaleco.

4-e. Kultura ekvilibrigo de ekonomio, ekologio kaj socialo laŭ etiko de responseco

kadre de transkultureco kaj transdisciplineco (kulturoj de daŭripovo – KdD).

5-e. Longtempa (intergeneracia) perspektivo.

***Niaj venontaj genepoj pli ol verŝajne koncernatos! La nepoj, kiuj hodiaŭ vivas, ne estas la "niaj". Ni mem ja jam estas la nepoj, pri kiuj temas. Ni jam grave rilatas al daŭripovo, t.e. al NE-daŭripovo, NE-daŭripovo de niaj antaŭuloj kaj de ni mem, kiuj eĉ pli multe submetiĝis-submetiĝas al la ideologio, ke la la homo rajtas kaj povas regi la naturon – spite al la fakto, ke ekz. jam la Biblio parolas ne nur pri***



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

***la"submeto-", sed ankaŭ pri la "konservo-ordono". La damaĝoj por la naturobiosfero mem kaj por la homoj, vivantaj en kaj je ĝi, jarjare pligrandiĝadas – ĉefe kiel konsekvencoj de facilanima teknologio (Bopalo, Ĉernobilo, Fukoŝimo, sekvoj de klimatoŝanĝiĝoj kiel inundoj, erozioj, tempestoj, dezertiĝoj ktp.) aŭ kiel "facilanima" setlado de homoj en danĝeraj regionoj pro troa konfido je la teknologiaj povoj. Ni nuntempaj nepoj do konstatas: "Jam hodiaŭ granda parto de nia teknologia evoluigo kaj monaj rimedoj celas la forigon de la damaĝoj-detruoj, kiujn kaŭzis niaj antaŭaj generacioj... Kaj fakte estas tiel, ke ligatas...al tio la t.n."eternokostoj", kostoj pri kontrolado kaj sekurigado kiel ekz. ĉe la finstokado den radioaktiva rubo... Unu el niaj avoj, la filozofo Ernst Bloch, ĉi-kuntekste starigis la postulon, ke ĉiu interveno en la naturon, kiu servas al la homa re-produktado, devas servi ankaŭ al samtempa kun(re)-produktado de la naturo (t.n. "aliancteknologio")."*** **(2013)**

**6.** Social-ekologia daŭripovo devas esti ne nur kogna, sed ankaŭ sense-senteemocie spertebla kaj vivebla gvidprincipo (kulturo de ĉiutago).

***Pro tio do nova helpa modelo, kiu provas alproksimiĝon al la pornepe necesa.*** Temas pri la koncepto de "kulturoj de daŭripov(ec)o (KdD)". Ĝi havas du perspektivojn:

1-e. La rolo de kulturoj ĉe la planado de daŭripova evoluigo, kaj

2-e. la aplikado de ideoj de daŭropovo je kulturaj aferoj.

Ĝi riltatas al la serĉo kaj evoluigo de kulturkoncepto, kiu orientiĝas je la gvidnocio de social-ekologia daŭropovo. (2010) Tio, apude de la duaranga rolo de teknologiaj novigaĵoj, signifas estiĝon de konscio/valor-ŝanĝiĝo de la homoj –



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

mondskale en la senco de "universala mensostato" (angle "global mindset"). Kultura daŭripovo konkretiĝas forme de "kulturoj de daŭripov(ec)o", t.e. de kulturoj, kiuj scias, ke la de la homo kaŭzita (kolapsiga) krizo estas krizo de la kulturo (ĉar estas niaj kulturoj, kiuj regulas la rilatojn inter socioj kaj la naturo), t.e.

krizo de la homa racio-prudento. (2008) Ĉar la vorto "kulturo" devenas de la hindogermana vorto "kuel-" = "esti diligente okupata", oni povus sin demandi, ĉu ĉi-kuntekste temas pri ekzistorilata krizo de la "diligenta okupateco" de la homo. Tamen: La t.n. "novigaĵoj" kaj la fiksiĝo je ekonomia kresko, teknologio en ĝenerale, merkato kaj profito, ĝis nun gvidis la mondon nek al decide pli da justeco nek al "mezurebla" protekto de la vivmedio – ili pli facile akrigis la tergloban krizon. (2002; s/ d).

Necesas ŝanĝo den la gvida paradigmo kaj de la valoroj (2008) - "kompreno pri daŭripovo, kiu, samrajtigite kun la tri kolonoj-kampoj ekonomio, ekologio kaj socialo ampleksas ankaŭ kulturon kiel kveran dimension, kiu komprenas-realigas la sur diverseco, malfermiteco kaj interŝanĝado bazitan formadon den la tri kampoj kiel kultur-etik-estetikan ĝisformadon de daŭripovo – kulturnocio, kiu devenas de la naturaparteneco de la homo kaj principe kunpensas la homon kaj naturon same ampleksantan vivokuntekston." (2002; 2001)

Kulturoj de daŭripovo baziĝas i.a. sur la "Konvencio pri la Protekto kaj Progresigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimformoj" (UNESCO 2005), postulanta "integron den la kulturo en la daŭripovan evoluigon", sur sistema pensmaniero, sur la ideonivelo pri "senkondiĉa enspezo", sur konsekvenca partoprenigo den la civilsocio, sur kritikema partoprenado en demo- kaj bio-kratioj, sur kritikema pritaksado den teknologioj kaj amaskomunikiloj, sur protekto kontraŭ patentoj pri genomoj, sur kulturo de malplio kaj sur la integrado den la potencialo de la artoj (s/ da; s/ db) ktp.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kaj finfine ankaŭ sur daŭripovo de la kulturo mem (ekologie daŭripova ekonomiado en kulturprojektoj, kiel ekz.Esperanto).

Kulturoj de daŭripovo unusignife kontraŭas dominon de la ekonomia, de la konsumo kiel esprimo de homa libereco (kvazaŭ civitana devoligo al kaj motoro de la konscia kaj ĉiam plifortigata kreskomodelo de la superrega "homo oeconomicus").

La kernaj problemoj estas: "Kiel atingi de la ekonomicentrigata kulturo de globaligo social-ekologian kulturon de daŭripov(ec)o" (= transformado den la socio). "Kiaj organiz- kaj komunikad-formoj subtenas-progresigas kulturan diversecon anstataŭ detrui ĝin? Daŭripovo bezonas ne nur novajn paradigmojn, mondkonceptojn aŭ valorojn (= kulturoj de daŭripovo), sed ankaŭ novajn formojn de komunikado (kulturan strategion de la daŭripovo), kiuj konstante progresigas kulturan evolucion kaj malhelpas la realigon de memreferencemaj kulturprocesoj ("merkato", "progreso", mono, socialkontroloj, teknologioj, armiloj, demokratio (!), kulturinterŝanĝoj kiel ekz. ankaŭ Esperanto ktp.) kiel logiko de la kreskokulturo. (2008) Konstatendas ĉikuntekste, ke la Brundtland-Raporto kaj la el tiu evoluigita Agendo21 persistas pri la tezo pri la nerezignebleco de ekonomia kresko.

Intertempe ŝajne estas fakto, ke korektoj koncerne la ekzistantajn ne-daŭripovajn produktado- kaj socio-modelojn estas farataj nur por ilin kontinui. Deiĝi de tio estas nun unu el la ĉefaj taskoj de la KdD. (2009; 2008)

***Pro kio do niaj futuraj nepoj nin benos, se ni kiel la nunaj nepoj de antaŭaj responsaj avoj ne forlasas la vojon al videbla kolapso…***

Koncize resume:

Estas kvar ekologiaj ĉefreguloj:

1-e. Regenerado., 2-e. Substituado, 3-e. Adaptipovo, 4-e. Riskoevito Estas

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

tri mediopolitikaj ĉefprincipoj: 1-e. La principo de antaŭzorgado, 2-e. La principo de la kaŭzulo, 3-e. La principo de kunlaboro.

**7.** Kulturo, lingvo kaj komunikado estas decidaj kampoj de la homa ekzisto. Sed sendepende de siaj detalaj difinoj ili devas akcepti esti mezurataj je la principoj de socialekologia daŭripovo (kp. la koncepton-uzon den la interreto, den lingvoservoj, den la Eo-Movado, den infrastrukturoj kaj realigo-manieroj en la kultur- kaj sport-industrio ktp.).

Kulturo ne pravigas mediodetruon, jen la moto. La nedaŭripovaj, vivmedie minacaj efikoj de aplikata kulturo estas facile ekscieblaj en la interreto. Tiu lasta mem intertempe produktas mondvaste tiom da karbondioksido kiom la tuta monda aertrafiko, kun altiĝa tendenco.

Simila validas por la produktado-konsumo-uzado den elektronikaĵoj ("diĝita toksado") kaj de papero en informado, komunikado, varbado ktp. kaj por la "malpura turismo". En la t.n. "Marakeŝ-Proceso" de la medioprogramo de la UN, kiu okupiĝas pri progresigo de daŭripovaj konsum- kaj produkt-modeloj, komunikado estas nun unu de la pivotaj temoj . (s/ d) Aparte de tio estas kelkaj metodoj por sufiĉe detale kaj precize mezuri la ekologian adekvatecon de la propraj agoj kaj produktoj (vd. la "ekologian piedpremsignon", la "ekologian dorsosakon", la "virtualan akvon", internaciajn kaj naciajn indikilojn pri malriĉeco, sanindikilojn ktp.)

Ĉi tie konkretiĝas la koncepto pri tio, kion oni nomas la "triopo de la strategioj pri daŭripovo":

1-e. Konsisteco, t.e. la daŭripovo kiel principo.

2-e. Efikeco, t.e. elekto de la plej energi- kaj resurso-ŝparaj opcioj por iu

celo.

3-e. Sufiĉeco, t.e. atento pri la ĝustaj mezuroj kaj limigoj. (s/ d)

Pliaj konceptoj rilate la kuntekston de "kompetenta kulturo de malplio" estas la principoj de preventado kaj la maksimo "En kazo de dubo: Ne!" Ĉi lasta signifas, ke la malutilo de iu rimedo-paŝo ne devas esti science pruvata 100%e por sin deteni de ĝi (kp. la eternan diskuton pri la Formulo1 k.s.).

Eblas do formuli jene: Alta inteligento plus malalta enmeto = daŭripova evoluigo.

**8. *La enordigo de Esperanto, aparte de ties organizita-organizanta Movado, kadre de "nepotaŭga" nuna-estonteca social-ekologia daŭripova evoluigo ne estas malfacila..***

Oni povas distingi tri al aplikata Esperanto imanentajn elementojn, kiuj determinas-difinas ĝin social-ekologie daŭripove. Ĉi kriterioj akordiĝas kun la Ungvidprincipoj (vd. supre) kaj konsistigas moderne adaptitan formon de la "interna ideo", pliampleksigata per la ekodimensio.

Jen do la daŭripovo de Esperanto (2013a; 2013b):

Transe de materialaj-konkretaj aspektoj Esperanto kompreneblas kiel intera komunikado, kiu plenumas postulojn, esencajn por la ekologio mem kiel sistema tuto de la interrilataro de ĉio viva, ĉi-kaze de la pensa viva.

Male al ĉiuj etnaj lingvoj Esperanto estas social-ekologie daŭripova rimedo de (inter-)komunikado ĝuste pro tio, ke ĝi pro si mem estas preventiva. Nur tre malmultaj homaj eltrovaĵoj povas aserti tion pri si. Ĉi tiu imanenta social-ekologia daŭripovo prezentiĝas en tri formoj, nome kiel 1-e: Integra Ttranskultureco (unuiga-



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kunliga lingveco) 2-e: Demokratia dulingveco (egaleco kaj justeco) 3-e: Ekologia konformeco (stabileco de la biosfero) En detaloj tio signifas: 1-e: Laŭ homekologia kaj socilingva kriterio kaj rilate la mondvastan krizon de biolo-gia kultura diverseco Esperanto estas integra lingveco. Kiel "1 lingvo por ĉiuj" ĝi estas socia kaj sociala lingvo de universala vivoformo, dekomence respektanta la gepatrajn lingvojn kaj kulturojn de ĉiuj, kiuj ĝin uzas kiel superan memidentiĝon, kreante kaj utiligante unikan rezervujon de spertoj kaj konoj-scioj pri kaj en universale vivata **integra transkultureco**.

2-e: Laŭ kvalita kriterio kaj rilate la mondvastan krizon pri justeco kaj egaleco la utiligo de Esperanto kiel "1 lingvo por ĉiuj" sur interkultura, interetna kaj inter-nacia niveloj estas socie kaj sociale daŭripova interkomunikado, ĉar ĝi dekomence reduktas porsociajn riskojn pro tio, ke ĝi forigas la avantaĝigon den ajna etna lingvo - efektivigante universalan justecon-egalecon rimede de la preventive justiga principo de "**demokratia dulingveco**" (egaleco kaj justeco).

Esperanto estigas tion, kio estis deklarata de la filozofo J. Habermas kiel "la fundamento de ideala parolsituacio - la egaleco de ŝancoj por realigi la parolon." (2007)

Al la koncepto de demokratia dulingveco apartenas enkonduko-utiligo de Esperanto kiel oficiala, sed libervola ebleco por tiuj, kiuj tion volas ("solidara libervoleco"). La demando, ĉu Esperanto savus la kulturan diversecon, ĉikaze superfluiĝas.

Estas intertempe bone konate, ke egaleco ne nur tuŝas "idee" demokratian dulingvecon kiel tian, sed ankaŭ konkretajn financajn avantaĝojn de tiuj nacioj, kies lingvoj estas reale plej uzataj internacie kaj kiujn tiuj, kiuj ilin denaske ne sci-povas, konstante je propraj kostoj kaj tempo devas lerni. La penado de la unuopulo pri kronika lernado de fremda lingvo similas al la virtuala akvo, kiun "kunportas" varo - oni ĝin ne



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

vidas, tamen gi ekzistas kaj plej ofte ŝarĝas nenecese.

3-e: Laŭ kvanta kriterio kaj rilate la mondvastan mediokrizon la utiligo de Esperanto kiel "1 lingvo por ĉiuj" sur regiona kaj superregiona niveloj estas ekologiedaŭropova, ĉar ĝi dekomence reduktas pormediajn riskojn pro tio, ke ĝi minimumigas la malavantaĝojn por la biosfero – efektivigante universalan medioprotektadon rimede de la preventive ekologia principo "evitado den priresursa disipado kaj denalbiosfera toksado" ( **ekologia konformeco** ).

Jen do la ĝisdatigita difino de la Esperanto- projekto: ***" La neŭtrala internacia lingvo Esperanto kiel dua lingvo por ciuj laŭ moderna alestonteca nepotaŭga vidpunkto konsideratas kiel la lingva parto de social-ekologie daŭripovainternacia-transkultura komunikado-interkompreniĝado de la mondo."***

Esperanto reduktas la nombron de la tradukvojoj de "n x (n-1)" al "n", se "n" estas la nombro de lingvoj, en ekz. la Eŭropa Unio (EU) nuntempe de 506 al 23. Aldone la impostŝarĝo de la averaĝa civitano de la EU por lerni Esperanton reduktiĝas al malpli ol 5 %-j de tiu necesa por lerni 3 lingvojn kiel estas postulata de la EU. (2006)

Nia tempo ne estas tiu de Zamenhof. Samkiel la paco kaj la homaj rajtoj, ankaŭ daŭripovo estas modelo, kiu konektas (s/ d): ĝi efektive estas la natura kaj necesa plivastiĝo de la "interna ideo". Pro tio ankaŭ amendo de la UEA-statuto per la koncepto-identeco de "daŭripovo" estas natura, necesa kaj racia-prudenta pliampleksigo de la laborbazo de tiu plej granda esperanto-organizaĵo.

La "Asocio de Verduloj Esperantiostaj (AVE)" jam delonge klopodis amendi la statuton de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) en la direkto de daŭripovo (Universalaj Esperanto-Kongresoj: Prago 1996 - postulo, Berlino 1999 - negativa voĉdono, Florenco 2006 – maleblo de diskuto spite a la kongresa temo "Lingvoj,

2015 – Ano II – Volume II – Número V INNS – 2358-7482

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo", Kopenhago 2011- diskuto, sed hezitema respondo de UEA. En Montpellier 1998 estis sendata al UEA oficiala letero por amendi la UEA-statuton per kroma punkto "A3.d. (versio de 1980): eduki inter siaj membroj la konsciencon, ke iliaj agadoj devas akordi kun la principo de Daŭripova Evoluo sur nia planedo. Hodiaŭ eblus ankaŭ amendo, en kiu oni rilatas ekz. al la Ĉarto de la Tero kiel (aldona) bazo de la propra laboro. (s/ d)

La implikoj de ekologia amendo en la statutoj de oficialaj Esperanto-organizajoj respondas al jenaj ŝlosilaj mesaĝoj-proponoj de la "Raporto pri la Ligoj inter Biologia kaj Kultura-Lingva Diversecoj" (UNESCO, 2007):

- Diverseco estas grava antaŭkondiĉo por sekurigi evolu(ig)on, kiu estas medie, soci(al)e, kulture kaj ekonomie resilienca kaj daŭripova;

- Apartigite evoluantaj biologiaj kaj kulturaj diverseco-agendoj estu sisteme ligataj;

- La mediaj, soci(al)aj kaj ekonomiaj profitoj de diverseco estu integrataj en la planado kaj efektivigado den konservado kaj de daŭropovaj evoluigaj modeloj, projektoj, strategio kaj aktivecoj.

- Integrado de la valoroj de diverseco en la protektado devas okazi sur internaciaj, naciaj,regionaj kaj surlokaj niveloj;

- Plifortigi jam ekzistantajn kaj krei novajn modelojn por sciencistoj, komunumanoj kaj ailiaj sciuloj estu promociita por subteni la projektoplanadon;

- Kune kun UNESCO, la UN, la UN-Medio-Programo (angle UNEP), la "Konvencio de la UN pri Biologia Diverseco" (angle CBD) kaj la Monda Konservada Unio (angle UCN,) la respektivaj Esperanto-organizaĵoj povus in-kludi en siaj prioritatoj kaj agadoplanoj la plibonigitan komprenon pri la ligoj kaj sinergioj inter biologia kaj

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kultura-lingv(istik)a diversecoj, samkiel pri la rolo de kultura kaj tradicia scioj kaj surlokaj lingvoj en la konservado de biodiverseco.

"La koncepto pri konservado memorigas nin pri niaj devo al la naturo kaj al la estonteco, sen kiuj la rapido de ekonomia kresko estos sole mezuro pri la rapideco, per kiu ni alproksimiĝas la abismon". (s/ d)

Praktika ekzemplo: Kompreneble, Esperanto forme de siaj individuoj kaj kolektivoj efikas negative sur la medion. Ĉi-cele pripensendas ekz. "la ideologio de esperantisma mondprivoĝado". Por mildigi-nuligi la neeviteblajn kontraŭekolo-giajn efikojn pro la agado de la neoficiala kaj oficiala esperantismo oni bone povus establi kompensomeĥanismojn, ekz. partoprenadon en reforstigaj projektoj, simile al la ekofondusoj de usonaj verkistoj aŭ la ekstrapagoj de mediokonsciaj flugpasaĝeroj. Finfine oni ne forgesu, ke kongresoj-renkontiĝoj de esperantistoj estas kunvenoj de homoj, kiuj plejgrandnombre ja jam internigis la idealojn de la esperantismo kaj uzas ĉi eventojn ĉefe pro individuaj kleriĝaj celoj aŭ pure turismaj plezuroj (ĉi-kaze do en komuna neŭtrala lingvo). Similan postulon pri ekokonformeco jam faris ankaŭ la "Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj – EKE en sia "Deklaracio pri Ekologia Kulpo", 2009.

Ĝis nun ne ekzistas klara ekologia memidentiĝo de oficialaj Esperanto-organizaĵoj, kiu povus esti rigardata kiel daŭripova bazo de la propra vizio kaj agado. La strategia vizio por UEA, nuntempe sub plua evoluigo, parolas pri multe da sub-tenindaj aferoj, sed mankas sindono al ekologia daŭripovo en komunikado. La German Esperanto-Asocio almenaŭ deklaras sub "II. Nia vizio pri la estonteco":

"Ni deziras mondon vivindan, en kiu la homoj konsciiĝas pri sia responseco por la vivomedio kaj kontribuas al ĝia konservado. Sana vivomedio estas la





antaŭkondiĉo por ĉia homa agado. " Se sub "III.Celoj" ĉio ĉi denove reduktiĝas al pura antropocentrismo de "Nia deziro: Ni volas utili al la homoj", eĉ la intertempe sufiĉe konata rilataro inter kultura kaj biologia diverseco ne trovas mencion.

La Manifesto de Prago (1996) ne nur rekonfirmu la tradiciajn celojn de la Esperanto-Movado, sed ankaŭ antaŭenigu la lastan en direkton de daŭripovo per jena preamblo: "Biosfero kaj justeco. La homa specio estas parto kaj partnero en la tuto de ĉio viva sur la Planedo. La homfaritaj medio- kaj justeco-krizoj koncernas ankaŭ la komunikadoninterkompreniĝadon inter individuoj kaj kolektivoj sur regionaj kaj superregionaj niveloj. En la globalizanta mondo memorganizado-memkonservado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la vivo entute.

Esperanto estas neetna pontolingvo kaj kiel unu lingvo por ĉiuj imanente neŭtrala, lingve kom-petenta, egaleca-justiga kaj materiale maldisipa. Ni asertas, ke la tutmonda kom-unikado devas okazi laŭ principoj de dekomenca daŭripova evoluo, t.e. de ne-difektemo kontraŭ la biosfero kaj de atingado de tutmonde interhoma justeco. Ni estas movado de unuarange social-ekologie daŭripova interkomunikado-interkom-preniĝado.

Kohere kun la kvarpiliera koncepto de daŭropoveco, aparte sfere de la kulturoj de daŭripovo. S. Kirf publicis 2005 tekston kun la titolo "Esperanto - ĉu kontribuo al la efektivigo de la Agendo 21?" En ĝi estas detale klarigita, ke la atingado de inter-nacia kompreniĝo ĉe samtempa konsideremo de la principoj pri daŭropova evoluo povas okazi nur per helpo de planlingvo kiel Esperanto. Esperanto pro tio, ĉar ĝi ofertas certan funkcigarantion (tuj disponebla, senkosta kaj resilienca).

Koncerne la kvar pilierojn de la Agendo21 validas la jena: 1-e. En la sfero de

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

ekonomio: La necesa kaj tempa investo por akirado den universala lingva komunikadopovo estas konsiderinde pli egale distribuata al la unuopaj individuoj kaj nacioj.

2-e. En la sfero de kulturo: Por ĉiuj la tradukobaroj estas egalmaniere malaltigataj, estas kontraŭefikata la unuflanka dominado de unu superrega etna lingvo kaj de ties kulturo, la kultura medio de ĉiu unuopulo plivastiĝas, same la aliro al pli da kulturoj, la kompreno pri kulturo kiel tia kaj mondvaste la sciointerŝanĝo plifaciliĝas.

3-e. En la sfero de la socialo: En intera komunikado la principoj de egaleco, justeco kaj solidareco estas konservataj, la rekta interagado de ĉiuj estas faciligata, komunecoj de kulturoj fariĝas pli sperteblaj por ĉiuj, la aliro al informoj plifaciliĝas. Esperanto ne favoras ajnan gepatran lingvon kaj ofertas socialan alternativon al "multlingveco sen interkompreniĝo" kaj al "unulingveco sen kultura divers-eco."

4-e. En la sfero de ekologio: Kaj la konsumo-disipo de materialaj resursoj (krudmaterialoj, energio) kaj la enmeto de poluoj en la biosferon reduktatas. La diverseco de lingvoj kaj de ties kulturoj estas pli forte protektataj ol ĉe ekskludaj komunikadebloj per nur unu aŭ pluraj etnaj lingvoj (aktiva protektado den minorioj).

Resume: Ĉiu homo havu egalrajtigite la eblon, per laŭeble egala kaj malgranda investo kaj per minimumo da malutilo por la medio atingi la kapablon komunikadi per rekta, de tria persono sendependa dialogo sur internacia-interkultura nivelo kaj demokratie partoprenigi sin kaj sian kulturon. (Laŭ S. Kirf, 2005, modifita de la aŭtoro). (2005)

La ordinara civitano, eĉ pli la anoj de la t.n. civilsocio, certe sentas, ke ĉiukaze memevidentas, ke Esperanto en la postondoj de merkatorientata, biosfere detruema kaj potenciale nesociala globaligo estas groteskaĵo. Tia scenaro memorigas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

pri la eldiro de la usona ekonomiisto Herman Daly: "Fari eĉ pli bone ion, kion oni dekomence tute ne faru, estas tre perversa formo de progreso."

**9.** Restas la gravega problemo pro kio la gvidprincipoj de social-ekologia daŭripovo spite al sia relative simpla kogna-scienca-logika "memkomprenebleco" ne fariĝas konsekvence universale aplikataj.

Temas pri la "centra sfero de mensecoj rilate percepton, komprenon kaj komprenigon de mondkolapsigaj fenomenoj" kaj pri "la psikologiaj kapacitoj por la majstrado den ties sekvoj... devenante de tio, ke la normiga interkonsento pri la evito de negativaj… sekvoj nur tre iom-post-iome kaj nur parte atingos transkulturan universalan devoligon kaj ke institucioj kaj mensostrukturoj evoluas nur pli malrapide ol la tergloba minimuma konsento, ke oni ja "propradire" devus fari ion." (s/ d)

Temas pri la tensiokampoj inter "mi" kaj "ni", inter rajtoj kaj devoj, inter libereco kaj responseco, inter libereco, libervol(em)o kaj devigoj, inter evito-mildigo-reduktokompenso kaj adaptiĝo kaj ties efektivigiloj.

**Temas pri la kontraŭdiro inter avo- kaj nepo-rilataj tezoj pri justeco – laŭ papero de la aŭstra episkopo M. Scheuer: La avocentra: "Fine ankaŭ nenia feliĉo de la nepoj kompensos la suferojn de la patroj, kaj nenia sociala progreso repacigos la maljustecon, trafitan la mortintojn." Kaj la nepocentra, vidalvide al la klimatoŝanĝiĝo: "Fine nenia feliĉo de la nuntempuloj kompensos la suferojn de nepoj aŭ la mizeron de la eksterhoma naturo kaj nenia ekonomia kresko repacigos la maljustecon, kiu trafos la venontojn." (2011)**

Kaj ĉefe ja temas pri la malakordo-misproporcio inter scio (volo) kaj agado aŭ inter devovolo kaj agado... fone de la preskaŭ jam proverbeca demando: "Kiom da



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

katastrofo bezonas la homo?" Ĉi breĉo inter scio kaj ago estas ĉefe kultura, ĉar la homa agado estas ne nur objektiva, sed respektive dependa de la kultura fono. La cerbo tieldire estas "biokultura organo". (s/ d)

Esploroj pri kaj evoluigoj de la "etiko pri la vivmedio" intertempe liveris kelkajn rezultojn-alpaŝojn koncerne ĉi dilemon. "Daŭripovo bezonas morale taŭgan, politike portopovan, plurisman gvidetikon, kiu estas sociala samkiel transspaca kaj transtempa; kiu, simile al la homaj rajtoj, havas altan akceptadon kaj kiu permesas evoluigi efektivigeblajn, celkonformajn, detalajn normojn-regulojn por ekologiaj, ekonomiaj, socialaj, politikaj kaj kulturaj dimensioj de daŭripovo. Ĉi etiko ĝis nun mankas." (2001)

Ĝis nun daŭripovo estas ĝisfine kialigebla, sed nur tre malforte kaj heziteme realigata. Evidente mankas tio, kion oni nomas la transformadon de moralo en juron. La ĝisnuna etiko pri daŭripovo ne sufiĉe motivas, ĝi ne estas "agadokaŭza scio". Studoj pri la motiva problemo de la etiko pri la vivmedio montras, ke fakte ne ekzistas alta korelativeco inter la scio, posedata pri vivmediproblemoj, kaj la el tiu rezulta kompren(em)o pri necesaj ŝanĝoj de la kondutoj kaj la agadmanieroj mem koncerne la vivmedion. La plej alta korelativeco montriĝas inter la t.n. preteco al agado kaj la privivmedia konduto, t.e. kiu voĉigas sian intencon pledi-labori por la vivmedio, ankaŭ kondutas pli vivmediokonforme ol kiu ne publike sin dediĉas. (2001)

**Eĉ pli: Spite al la intertempe ĝenerale pli-malpli dividata sinteno, ke klimatoprotekto implicas devoligojn al estontecaj generacioj, estas "argumentoj por nedevoligado" . (2002) Jen: "Ni ne ekzakte scias, kiuj estos la futuraj homoj kaj kion ili volos, t.e. ni ne konas iliajn bezonojn kaj interesojn por scii kiujn heredaĵojn ni ŝuldas al ili. Jurpretendoj bazas sin sur bezonoj kaj interesoj. Kie tiuj ne estas precize**



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

**identigeblaj, ne estas konkretaj rajtoj kaj pro tio ankaŭ ne konkretaj devoj. Ni agas morale malĝuste nur, se iu determinebla suferas damaĝon. Sed tio ne eblas rilate al venontaj generacioj. Pro tio ne estas "viktimoj" kaj kie ne estas viktimoj ne estas devoligoj koncerne difinitan moralan konduton." (2002)**

**10.** Eliro el la dilemo inter scio-konvinko-volo kaj agado estas la revenokoncentriĝo de la moderna (vivmedi-)etiko al la "tuta" homo, t.e. al homo kiel unuo el racio kaj emocio (ankaŭ en la senco de unuo inter kulturo kaj naturo). Jam Aŭgustino diris, ke moralaj argumentoj, kiuj celas certan konduton, ne nur devas mense-racie konvinki, sed ankaŭ "tuŝi".

Alivorte: Moralaj argumentoj, por ke ili fariĝu agadogvidaj, devas havi racian logikan kaj emocian-empatian profundon. "Nur per la kunagado de racio kaj emocio eblas stabilaj konvinkoj, kiuj sekvigas respektivajn agojn."

Devas esti superata la racionalisma memkompreno de etiko. Por ke etiko fariĝu agadogvida, ĝi devas esti pli multe ol pura "kialiga projekto", kiu traktas la demandon pri sia realigo kiel postordigata problemo kaj delegas ĝin al helpsciencoj. Ĝi devas turniĝi al la tuta homo. El la moralpsikologio oni intertempe scias, ke ekz. responseco, ŝlosila nocio de la aplikata etiko, estiĝas en "profundaj tavoloj" de la personeco (2006) kaj ne nur sole per la racio. (2001) " Ĉikoncerne atentindas, ke inter la plejmulto de la vivmedietikuloj regas unuanimeco pri tio, ke la moderno kaj ĝia raciokoncepto mense preparis la terenon por la natur- kaj vivmedio-detruo.

Emocioj estas morale koncernaj. Ili estas "psike-anime tuŝaj, multenhavaj-ideigaj perceptoj, en kiuj periĝas morala ekkono. La emocio estas ne nur reago al tio, kio estas perceptata, sed kiel faktoro, kiu klarigas la perceptatan, esence apartenas al ĝi



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kaj pro tio mem havas kognan signifon. (2010) Kion ekz. humiligo signifas, oni scias nur, se oni sin demandas, kion signifas por homo esti humiligata. La enhavo de la morala nocio "humiligo" ne estas determinebla per la al ĝi rilataj faktoj ("humiligo estas, se tio aŭ jeno faktas"), sed klariĝas nur per nia kapablo al empatio (kvazaŭ oni mem travivus), per la kunsufero kun la aliulo, la kunsenta spertiĝo de ties sufero. (2010)

Devoligo al agado estas do motivata per la kuntrafiteca empatio pri aferojkuntekstoj, kiuj laŭ la racio ja "simple" evidentas. La kunefikado de racia-scienca devigo kaj de emocia-normiga percepto en la realigado de celo modele montriĝas per la estiĝo de Esperanto. Zamenhof estis absolute motivata al sia "racia-logika" lingvo per siaj emociaj-afliktaj perceptoj en la progromoj kaj ĉiutagaj suferoj. Ĉi lastaj kondukis lin al senpere sentata devigo al la projekto de kompetenta neŭtrala lingvo – devigo "absolute unuaranga, diskursive t.e. logike) al nenio regvidebla parametro." (1974) La "interna ideo" (paco kaj frateco) estas la nocio-koncepto fone de ĉi tiel komprenata-komprenebla projekto de Esperanto.

**Simile hodiaŭ, kiam ni ĉie sur nia Planedo kaj ene de la mondo spertas la krizojn pri justeco kaj la biosfero. Estas ja ne nur diskursivaj-diskursigaj sciencaj faktoj, kiuj teorie eldevigas daŭripovan evoluon por daŭripova estonteco, sed ankaŭ (kaj eble ĉefe) la plensense, empatie travivataj kaj traviveblaj sekvoj de la merkat- kaj profit-orientata kaj –dependa globaligo kun ties viktimoj kaj damaĝoj, nome se temas pri la kampo de la Esperanto-Movado, estas nuntempe rigardebla kiel rekta pliampleksigo de la interna ideo.**

**Resumo:**

**- Social-ekologia daŭripovo estas sen alternativo.**



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

**- La logiko de la aktuale superrega "monda mensostato" estas social-ekologie detrua kaj ne futurinda.**

**- Ankaŭ kulturo kaj komunikado grave rolas koncerne daŭripovon.**

**- La ne-daŭripova situacio de la Planedo kaj ties mondo estas homfarita kaj signifas krizon de la homa kulturo.**

**- La kulturoj de daŭripovo kiel kvera dimensio inter ekologio, ekonomio kaj socialo klopodas pri transformado den la ekonomicentrigata kulturo de globaligo al socialekologia kulturo de daŭripovo pere de celkonforma valorŝanĝo. Celoj estas intrakaj inter-generacia tutmonda justeco kaj stabileco de la biosfero. Tio fakte estas la esencaj kriterioj de streboj al daŭripova estonteco.**

**- Ni mem ja jam estas la nepoj, pri kiuj temas. La venontaj nepoj nin benos, se ni kiel la nuna homa socio sukcesas fermi la breĉon inter scio-volo kaj agado –kontraŭe al ekz. la malbona modelo de la aktuala universala aŭtomobilemo laŭ la eterna universala devizo "Aĉeti kvazaŭ ne estus morgaŭo." (Aŭtomobilekspozicio Detrojto, 2014).**

**Jen Andreas Lienkamp:**

**" Estas tre simpla vero, ke homoj, kiuj ankoraŭ ne vivas, ankaŭ ankoraŭ ne povas havi rajtojn. Sed estontece vivos homoj, kiuj havos rajtojn, kaj nome ja la samajn kiel ni. Kaj ĉi estonteco komenciĝas en la respektive plej venonta momento. Aktuale tutterglobe naskiĝas ĉiusekunde averaĝe 4,4 infanoj. Se oni rigardas tion, senpere evidentiĝas, ke la estontecaj rajtoj de la venontoj jam nun havas pretendojn al ĉiuj agopovuloj." (2010)**

**Fariĝas do tempo vidi kaj formi la futuran mondon vidpunkte de niaj infanoj kaj nepoj.**

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Per vortoj de germana ekonomiisto la agopovuloj estas ni nuntempuloj, kiuj laŭ la moto 'Homo sapiens anstataŭ homo oeconomicus' "povas helpi al la rekonsciiĝo de la homo pri sia kapablo agadi prudente kaj kompreneme, senti empation kontraŭ aliaj kaj zorgeme konservante trakti la naturon." (2013)

Lastinstance temas pri "Buen Vivir" ("Bona Vivo") por ĉiuj ene de la ekologiaj limoj de la Planedo.

Jen fine sen plia diskuto-diskurso komento de Constantin von Barloewen (Argentina antropologo kaj kultursciencisto) en la Suddeutsche Zeitung de 2011.11.05:

"Latinameriko fascinas, ĉar ĉisubkontinento dum la pasinta jardeko evoluis al 'laborejo de la monda civilizacio', en kiu, transede la ĉefaj universalaj tendencoj, oni sukcese serĉas pri respondoj al la neoliberala koncepto de la globaligo... La magia-mita pensado kapabligas la popolojn formuli nocion de la menso-racio, kiu permesas intuicion kaj empation, superante la abstraktadon de la racionalisma universalismo, kiu estas la fundamento de la okcidenta kapitalismo... Ĉi subkontinento evidente sukcese ŝanĝiĝas ne per imitado den, sed en distanco al la okcidentaj 'gvidiloj'. Ĝiaj ekspertoj diskutadas, ĉu teknika kaj civilizacia progreso estontece devas esti pli forte adaptita al kulturhistoriaj tradicioj…"

**Literaturo**

Asocio de Verduloj Esperantistaj. www.verduloj.org
BATESON, G., en n-ro 29.
BERICHT . Brundtland-Bericht unter www.jenseits-des wachstums.de/index.php?id=85358&&L=28id=8535. 26. http://www.iisd.org/sd/
BOHME, G. . ***Das Schwinden der Natur*** . Scheidewege 43. Hirzel. 2013.
BROCCHI, D. . ***Die sozialen Grenzen der Nachhaltigkeit***
www.davidebrocchi.eu/...2009_soziale_grenzen_nachhaltigkeit.pdf
***UMWELT . www.bmu.de/produkte_und_umwelt/internationale_aktivitaetenauf_***



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

***un_ebene/doc/39053.phpOEKODOC . www.oeko.de/OEKODOC7!§!(7"=!!-$§/-DE:PDF***

___________ . ***Die kulturelle Dimension der Nachhaltigkeit*** .2008. http://www.magazin.avinus.de/2008/01/26/ brocchi-kulturelle-nachha

BURGENLAND . www.alpbach-burgenland.at/.../Erfahrungsbericht%20Alpbach %202011

BUKO . ***Nach dem Scheitern dre Green Economy*** . www.buko.info

EART . Charta der Erde. www.eartchartainaction.org/.../fur%20Kinder%20

FISCHER, J.. *"Grundlagen der Moral aus ethischer Perspektive und aus der Persepktive der empirischen Moralforschung" In* **Die Struktur der moralischen orientierung** . Wien: Interdisziplinäre Perspektiven. 2010.

FREIMANN, J. . ***Des Menschen Wolf – Wie die Herrschaft der Geldökonomie unser Leben zerstört und was wir dagegen tun können*** . Metropolis: Marburg, 2013.

FUTURES. The journal of policy, planning, and future studies, 2010, v. 42.

GEHARD, G. . www.globalisierungsdebatte.de/entglobalisierung.html

GEHRIN . www.tagesspiegel.de/...welzer...gehirn...bio-kulturelles-organ/3745734.h

GRABE, L. . ***Das Projekt Nachhaltigkeit*** . Cultur21 eBooks Series on Culture and Sustainability, 2010

GROBER, U. . ***Die Entdeckung der Nachhaltigkeit*** . Verlag Kunstmann.2010

GUNTHER, W. . **Esperanto 2013 – kien** . Kiosko 7. Esperanto-Eldoneyo Nula Horo. 2013.

___________ . **Esperanto kaj kulturoj de daŭropoveco – Fono kaj nocioj koncerne la argumentadon pri ekolgia identeco de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto**. Kiosko 7. Esperanto-Eldoneyo Nula Horo. 2013.

HAMAKER, J.D. . ***The survival of Civilization – Carbon Dioxide, Investment Money, Population***. Hamaker-Weavers Publishers. 1981.

HASZPRA, O. . **Egaleco kaj alta efikeco en la internacia komunikado**. Literatura Foiro 223. 2006.

KAGAN, S. ***Art and Sustainability*** . Transcript 2011.

___________ . ***Cultures of sustainability and the aestheticasof the pattern that connects***.

___________ . Kp. n-ro 29.

KAGAN, S & KIRCHBERG, V. (Hrsg.) . ***Sustainability: a new frontier for the arts and cultures***. VAS.

KIRF, S. . ***Esperanto-Ein Beitrag zur Umsetzung der Agenda 21?***. 2005. diplom.kirf.de/

KRAINER, L. & TRATTNINGG, R. (Hrsg.) . ***Kulturelle Nachhaltigkeit*** . oekom 2007.

KURT, H. & WAGNER, B. (Hrsg.) . ***Kultur, Kunst, Nachhaltigkeit*** . Essen: Klartext Verlag. 2002,

vgl. hierzu : Tutzinger Manifest. Evangelische Akademie Tutzing. 2001.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

www.kupoge.de/ifk/tutzingermanifest
LEGGEWIE, C. & WELZER, H. . ***Anpassung an das Unvermeidliche? Klimawechsel als kulturelles Problem***. polar #6:Wie leben?. http://polar.zeitschrift.de/polar_06.php?id271
Gerechtigkeit – Verantwortung für die Zukunft. Alpbach. 24. August 2011.
LIENKAMP, A. . "*Menschenrechte zukünftiger Generationen" In* ***Fiph Journal***, Nr. 16.
MASSARRAT, M. . "*Chancengleichheit als Ethik der Nachhaltigkeit: Überlegungen zu einem neuen Konzept*" *In* ***Widerspruch***. 2001. Heft 40.
MATOBA, K. & SCHEIBLE, D. . ***Interkulturelle und transkulturelle Kommunikation*** . Working Paper of the International Society for Diversity Management e.V., 2007, N 3.
MITWELT . www.mitwelt.org/wachstum/wachstumskritik-information.html
MUGGLE, G. . ***Seminar Sprache und Ethik. Zur Entwicklung der Metaethik*** . Suhrkamp, 1974.
National Geographic Magazine,. Sept 2013. Rising Seas.
NICOLESCU . basarab.nicolescu.perso.sfr.fr/ciret.../charten.ht
OTT, K. . "*Ethische Aspekte des Klimawandels*". *In* SCHEODER; MEINHARD *et al* (Hrsg.) . ***Klimavorhersage und Klimavorsorge .*** Springer, 2002.
PANDA . www.panda.org/about/living_planet_report
PRICHARD, H.A. . "*Beruht die Moralphilosophie auf einem Irrtum?" In* GREWENDORF, G.
ROTTEN . rottensystem.blogspot.en/.../Folien_Systemische_Ursachen_der_glob
ROSENAU, H. . "*Nachhaltigkeit leben – sapientiale Interpretation einer umweltethischen
Leitkategorie" In* ***Umweltethik .*** Berlin, 2006.
SACHS, W. . ***Die Armut sinkt, aber die Umweltkrise verschärft sich***. www.ciromero.de/file/admin/download..2005_2_umweltkrise.pdf The closing circle neu gelesen. www.umweltethik.at
***__________ . Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit. POLIS, 1. 2004***
***__________ . Ökologie – die neue Farbe der Gerechtigkeit*** . 2002. http://www.l.unihamburg.de/Globale_Zukunft/ ausarbeitungen/sachs/htm.
SEIDEL, I. Seidel & ZAHRNT, A. (Hrsg.). ***Postwachstumsgesellschaft: Neue Konzepte für die
Zunkunft*** . Ökologie und Wirtschaftsforschung. Band 87. Metropolis. 2010.
THEOBALD, W. . "*Ethik der Nachhaltigkeit*" *In* ***Scheidewege 43*** (vgl. nr. 28)
TRITTIN, J. . ***Ökologischer Materialismus – Wie die Natur politisch wird*** . polar 6 –
IF-*Sophia*
Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica 58 2015 – Ano II –



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Volume II – Número V INNS – 2358-7482 Wie leben. 2012
UNESCO . www.unesco.de/fileadmin/medien/Dokumente/unesco.../uh_2_2011.pdf
**www.globalisierung-infos.de**
VON CARLOWITZ, H.G. . ***Sylviacultura oeconomica***. 1713. Verlag Kassel.
VOROT . vorort.bund.net/suedlicher_oberrhein/wachstumskritik.html
WEBER, A. . ***Enlivement. Heinrich Böll Stiftung***. Publication Series Ecology. Vol. 31. 2013.
WIKIPEDIA . de.wikipedia.org/wiki/Globale_ Erwärmung
___________ . de.wikipedia.org/wiki/suffizienz_(ökologie)
___________ . de.wikipedia.org/wiki/Ökoeffizienz
___________ . de.wikipedio.org/wiki/Soziale_Nachhaltigke
**___________ . http://de.wikipedia.org/wiki/Drei-Säulen-Modell**